**Vortoj de Andreo CSEH**

**por lernantoj: La sekreto de la sukceso estas ne silenti , sed paroli kuraĝe, forte kaj elegante.**

**por instruantoj: Gajeco ne estu la celo, sed rimedo, kiu aldonas "guston" al la lecionoj.**

# BAZARO

**Esperantlingva revuo**
**Cluj-Napoca, Jaro I, Numero 2**
**1997, Somero**

## ABONO !

Kiu deziras pluen ricevi la gazeton BAZARO, perpoŝte sendu 2000 leojn aŭ poŝtmarkojn egalvalorajn, al jena adreso:

**C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por KOLOZSVÁRI Zsolt aŭ**

**C.P.2OO. RO-3400 CLUJ-NAPOCA SIGMOND Júlia**

Tiu ĉi sumo reprezentas la egalvaloron de la sekvonta numero. Por tiuj, kiuj ne pagis por la antaŭaj numeroj, kaj ankaŭ ĉi-foje ne pagos, ni konsideras, ke ili deziras malaboniĝi, kaj tiel la nuna numero de BAZARO estas la lasta kiun ili ricevos.

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

## ALVOKO !

BAZARO intencas aperigi la liston de Rumaniaj geesperantistoj jam komence de 1998, tiucele bonvolu sendi urĝe viajn datumojn ĝis la fino de 1997, ĉar alikaze pro manko de sufiĉaj datumoj ni ne povas aperigi ĝin.. Personoj enlistigotaj havos neniun devon, ekzemple gastigi aliajn esperantistojn, loĝigi aŭ helpi ilin. Tiu listo servos nur kiel adresaro kaj dokumento pri la nombro kaj loĝloko de geesperantistoj en Rumanio.

Tiusence mi petas vin fotokopiu la jenan formularon, disdonu ĝin inter la geesperantistoj de via klubo aŭ urbo kaj plenigite resendu al ni. Vi povas nur simple skribi sur blanka papero la datumojn petatajn de la formularo kaj sendi ĝin al la redakcio.

| | |
|---|---|
| Familia nomo: | Persona nomo: |
| Naskiĝdato: | Sekso: vira\vrina |
| Adreso: | |
| Urbo/vilaĝo: | Poŝtkodo: |
| Telefono: | Profesio: |

Laŭdezire vi povas malplenigi unu aŭ pli da rubrikoj, pri kiu vi opinias, ke ĝi restu "sekreto".

( Ĝis nun 50 personoj sendis al ni la datumojn el 9 urboj.)

Redakcio:
ASOCIO de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111 RUMANIO
*Eldonas:*
Eldonejo DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca, RUMANIO kaj
MUNICIPA KULTURDOMO
P-ta Unirii n-ro 24
RO-3400, Cluj-Napoca, RUMANIO
***Redakcia komitato:***
Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia, KOLOZSVÁRI Zsolt

*Redactia:*
ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111 ROMÂNIA
*Editata de:*
Editura DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca, ROMÂNIA si
CASA MUNICIPALA de CULTURA
P-ta Unirii nr. 24
RO-3400, Cluj-Napoca, ROMÂNIA
***Comisia de redactie:***
Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia, KOLOZSVÁRI Zsolt

# KIA RELIGIO ESTAS ESPERANTO?

Inter 23-29 junio 1997, mi partoprenis en Graz la 2-an Eŭropan Ekumenan Renkontiĝon. La ĉefa celo de ĉi renkontiĝo estis la repaciĝo!

Pasintjare en Szombathely, Hungario, dum KKK (Komuna Kristana Kongreso) IKUE-anoj kaj KELI-anoj decidis la ĉijaran ĉeeston en Graz, por ekzemplon doni al ĉiuj partoprenantoj. Ja ni, geesperantistoj jam delonge "repaciĝis", ni havis jam 12 Ekumenajn Kongresojn!

El 18 landoj 45 geesperantistoj dejoris ĉe E-stando en la grandega AGORA. Laŭ mia scio pli ol 20.000 da personoj vizitis dum tiu semajno Grazon. El Rumanio pli ol 1.000! Ĉiutage centoj vizitis ankaŭ la E-standon. Senlace ni klarigis kaj informis ĉiujn interesiĝantojn.

Unufoje aperis angla junulo kaj demandis min: Kia religio estas esperanto? Mi ekridetis, sed poste mi provis klarigi al li: Esperanto estas la "religio" de ĉiuj pacemaj kaj amplenaj homoj. Per "Esperanto-religio" ni povas kompreni unu la alian kaj per ĝia helpo iĝi veraj gefratoj, ja ni ĉiuj estas infanoj de la *Bonadio*.

Mi devas rakonti du el multaj neforgeseblaj eventoj, kiujn mi havis dum tiu semajno.

Dum la malferma renkontiĝo, post eta pluvo aperis ĉielarko, sed ĝi ne estis simpla, ĉiutaga. Komence aperis nur la unua, poste pli supre, ĉe iom da distanco, la dua. Sed ĝi ne haltis ĉi tie. La suba ĉielarko unue duobliĝis, poste - nekredeble - triobliĝis. Kiel **dia signo** brilis la fortaj, belegaj koloroj super miloj da homoj, kiuj renkontiĝis - **nun kaj ĉi tie** - por repaciĝi. Neniu ĝis tiam vidis similajn ĉielarkojn.

La dua neforgesebla evento okazis dum la lasta, adiaŭa renkontiĝo. Ĉi okaze la vetero estis belega, sur la ĉielblua firmamento eĉ unu ciruseto ne estis videbla. Diversnaciaj kaj diversreligiaj kristanoj komune preĝis kaj kantis. Paco regis en la koroj de dikredantoj. Ni forte sentis, ke nun, nia Dio estas kontenta. Dum la preĝado ĉiu ĉeestanto metis sian dekstran manon sur la ŝultron de sia najbaro kaj per ĉi tiu gesto kvazaŭ ni iĝis UNU HOMO - kun multaj koroj. Post komuna kantado sekvis la preĝo de la Sinjoro: PATRO NIA. Ĉiu diris en sia nacia lingvo, tamen en perfekta ritmo kaj harmonio.

Multaj homoj ploris. En nia animo kreskis la espero, ke nia Dio ne nur aŭdas, sed ankaŭ aŭskultas nian elkoran preĝon. Estos paco kaj amo sur la Tero. TIEL ESTU!

'SIGMOND Júlia, CLUJ-NAPOCA

# UNUIĜAGADO, ORGANIZADO KAJ INSTRUADO

Tuj post la Revolucio, mi kaj multaj aliaj esperantistoj el Rumanio entuziasme kredis, ke finfine ni estas liberaj kaj ni povos unuiĝi kaj krei fortan, internan movadon. Bedaŭrinde, la eventoj alie evoluis, tiel ke nun la rumana Esperanto-movado estas sufiĉe malforta, precipe pro la malunueco. Jam pasis 7 jaroj de tiu jaro 1990, kiam reformiĝis REA, kaj alvenis la momento, ke ni decidu agi kune kaj pli organizite. Eble per via ĝuste nun alveninta revuo ni sukcesos. La ideo publikigi la liston pri la rumanaj geesperantistoj povas esti alia bona ideo, sed tio ne sufiĉas. Oni devas publikigi ankaŭ la adresojn de ĉiuj Esperanto-kluboj, asocioj, grupoj aŭ institucioj, kiuj okupiĝas pri Esperanto, tiel ke ĉiu inter ni povu facile trovi la aliajn. Je la fino de ĉi tiu ago, oni povas eldoni Rumanian jarlibron.

Pri instruado mi havas apartan opinion. Ĝenerale, en la E-Rumania movado regas la ideo, ke ni unue devas zorgi pri la instruado de studentoj, tiel ke oni parolas pli multe nur pri la universitata agado. Laŭdinda laboro, sed ŝajnas al mi, ke tiu situacio similas al iu nova metodo per kiu oni konstruas unue la tegmenton kaj nur poste la fundamenton de la konstruaĵo. Kiom da gelernantoj lernas Esperanton en Rumanio? Kiu faris statistikon? Kiu kuraĝigis la instruadon en aŭ apud la lernejoj? ktp. Do, estus bone se en BAZARO aperus ankaŭ listeto kun la instruistoj kaj lernejoj kiuj toleras la instruadon de Esperanto. La rumana lingvo similas multe kun Esperanto kaj la gelernantoj rapide povas lerni ĝin. Nek la hungaroj, nek la ĉehoj havas tiun avantaĝon, kial do ili estas avancitaj? Eble, ĉar ili rekonis la gravecon instrui la infanojn.

Tio ne estas simpla teorio. Mi povas demonstri praktike tion, per mia sperto. Dum la jaro 1994/1995 mi komencis instrui Esperanton ĉe la lernejo "MIKES ÁRMIN" el BICSAD, distrikto COVASNA, kadre de la internacia eksperimento FUNDAPAX-Projekto. Je la 1-a de junio 1995, mi fondis la LERNEJAN EKOTURISTAN KLUBON "ESPERANTO kaj NATURO" kun precizaj objektivoj por kvarjara periodo, ĝis kiam la gelernantoj finos la okan klason. Unu el la objektivoj estas la perfektigo de kelkajn diligentajn gelernantojn, kiuj emas lerni Esperanton. Tiel mi elektis kvar el la plej bonaj gelernantoj kaj mi akompanis ilin al UK 1996, Prago. La infanoj partoprenis la Internacian Infanan Kongreseton. Nun la gelernantoj sekvos la sepan klason kaj ankaŭ mi sekvos la ideon por atingi alian ŝtupon je ilia perfektiĝo. Por komenco, mi iniciatas la unuan SOMERAN LERNEJAN TENDARON" Espernato kaj Informatiko", en BICSAD, inter la 14-23 de julio 1997. La tendaron partoprenos ĉirkaŭ 43 gelernantoj el 6 diversaj lernejoj. Mi invitis ankaŭ la E-grupon de lernantoj el Turda, ĉar ili komencis lerni laŭ mia metodo kaj ili esprimis la deziron perfektiĝi. Tieaj infanoj estos akompanataj de s-ino instruistino Eugenia-Speranta CORÂCIU. El Nederlando alvenos nia kolego,

s-ro TON VERWOERD, kiu same instruos, do nia renkontiĝo fariĝos iomete internacia. Pri la rezultoj mi faros apartan "raporton". La perfektiĝo de la gelernantoj el Bicsad daŭrigos ankaŭ dum la printempo de 1998 ĉe Kastelo Grésillon kaj pluen. Ĉar delonge mia plano estas helpi la gelernantojn lerni kaj perfektiĝi je la studado de Esperanto, miaj sekvontaj agoj estos ligitaj de tiu ideo. Inter la eksterlandaj gekolegoj mi trovis bonajn reagojn kaj subtenon tiucele. Mi pensas speciale por la lernantoj el la vilaĝaj lernejoj, kiuj havas malmultajn eblecojn studi aŭ pagi la vojaĝojn ktp. Sed pri tiu ideo mi revenos estonte. Mia propono estas, ke esperantisto, eĉ se li troviĝas sola en izolita loko, kiel mi, strebu organizi ion, ke nia komuna celo ekfloru kaj Esperantujo disvolviĝu. Se pere de nun aperinta revuo BAZARO ni scios unu pri la alia, certe ni sukcesos pli rapide, ĉar multfoje eĉ la simplaj kuraĝigoj gravas kaj puŝas nin antaŭen.

Mihai TRIFOI, BICSAD

## Impresoj de komencanto

La vento varmeta blovas forte. Ĝi estas malfrua kaj mi troviĝas en mia ĉambro dum la nokto, kiu batalas kun la tago kiam la luno aperis sur ĉielo, kvazaŭ ĝi dirus: "Du batalas kaj la tria gajnos!"

Guste mi eltrovis, ke la nokto ne estas bela sen la batalo de la vento kun la arboj kaj kun la floroj. Mi deziras forlasi mian fortikaĵon por ke mi povu kaŝiĝi ie, iam, iel...

Se la vento estus persono, ĝi amus la naturon, la teron, la arbojn, la florojn, kaj mi pardonus ĝin pro kiu ajn malperfekteco. Sed Dio kaŝis ĝin tial, ke la mondo estas malĉarma, kun militoj, malbonaĵoj, malveraĵoj, mensogoj, malkonfidoj, larmoj...

Eĉ se la homoj estas malbonaj, mi amas ilin pro tio, ĉar ili havas la muzikon, la revuojn, la astrologion, la feriojn, la somerojn, la verdaĵon de la printempo, la esperojn, la festojn...

Mihai-Aurelian BOGDAN, TURDA

## ĜUSTIGO

En n-ro 1 de BAZARO, en la artikolo *La plej konsiderinda vidindaĵo de nia urbo* de ASZTALOS Lajos, perdiĝis frazo sen kio la teksto fariĝis nekomprenebla. Legu ĝuste:... supozeble jam estis preta. Ĉar la urbo intertempe kreskadis, oni modifis la konstruplanon. Tielmaniere....

La red.

# MEDICINAJ INTERESAĴOJ

## Enzimo, kiu provokas la memdetruiĝon de la ĉeloj

En la WEIZMANN INSTITUTO (REHOVOT, ISRAELO) malkovris enzimon, kiu estas armilo kaj provokas la memdetruiĝon de la ĉeloj en la homa korpo. Tiun enzimon malkovris grupo de la scienculoj, kiujn gvidas profesoro David WALLACH. Helpe de ilia malkovro malfermiĝis nova vojo en la kuracado de la aŭtoimunecaj malsanoj. La aŭtoimunecoj malsanoj, ekz. la junaĝa diabeto, multobla sklerozo, AIDS atakas erare la proprajn ĉelojn, eĉ tiuj havas rolon okaze de eljeto de la transplantitaj organoj.

Prof. D.WALLACH estas konvinkita, ke ĉiuj ĉeloj en la homa organismo, genetike havas memdetruitan programon. En certaj cirkonstancoj tiu programo aktiviĝas kaj provokas la memdetruiĝon de la ĉeloj. Normale tiu programo aktiviĝos okaze kiam alvenas la natura morto de la ĉeloj. Okaze de malsanoj, kiam tiuj estas konataj por la imuneca sistemo, tiuj indikas la memdetruiĝon de la ĉeloj. La procezon direktas kemian "mesaĝiston", kiuj ekstere atingas la ĉelojn kaj informas la ĉelon pri la situacio, do ili ordonas helpe de tiu memdetruiĝo-programo la memdetruiĝon de la ĉeloj. Tiun mesaĝon peradas la ĉenserio de la biokemiaj procezoj.

La grupo de prof. D.WALLACH sukcese sekvis tiun procezon en laboratoriaj cirkonstancoj. Ankaŭ por ili sukcesis interveni en tiu memdetruiĝa programo. La malkovro de tiu enzimo havas gravan rolon ankaŭ en la terapio, ĉar pere de novaj medikamentoj sukcese kuracados tiujn malsanojn, kiuj havas rilaton kun la fiasko de la imuneca sistemo. Tiu povas esti espero ankaŭ por la AIDS gemalsanuloj.

## Nova medikamento kontraŭ lipa herpeto.

En Israelo malkovris novan medikamenton kontraŭ lipa herpeto. La ungvento ULTRAVIR malhelpas la disvastiĝon de la malsano. La ungventon aplikadas surloke kaj la sukceso de la terapio estas 8O%.

La ungvento malhelpas ankaŭ la recidivojn. La dermatologo de la Rambam hospitalo (HAJFO, ISRAELO), prof-ino Rachel FRIEDMAN opinias, ke la nova medikamento, ULTRAVIR ungvento baldaŭe estos vendota ankaŭ en la internacia merkato, do helpos tutmonde la suferantojn.

## OLIVO por la diabetuloj

Antaŭ nelonge finita esploro pruvis, ke la siropo de la koncentrita ekstrakto el la olivo folio signife malaltiĝas la sukeran nivelon en la sango de la diabetuloj. La kuracistoj, kiuj malkovris tiun efikon, nun konsilas, ke tiun siropon uzadu por la ĉiutaga dieto de la diabetuloj. Dum la preparo de tiu studo, 14 semajnoj kun 85 diabetuloj uzadis la koncentritan siropon kaj ili spertis, ke ne nur la sukerenhavo de la sango malpliiĝis, sed tiu favore influas

ankaŭ la sangonivelon de la insulino.

**AVOKADO kontraŭ stomaka ulcero**

En la hospitalo Rambam (HAJFO, ISRAELO), prof. Moshe HASMONAI studadis la efikon de la avokado konsumado por la ulceraj gemalsanuloj. Li spertis, ke la avokado protektas la stomakan mukozon, tiel malhelpas la stomakan ulceron, eĉ ĝi favoras ankaŭ la resaniĝon.

**TOMATO en la katarakto**

Prof. Zacharia MADOR (Hebrea Universitato, JERUSALEMO) spertis, ke la tomato enhavas substancon, kiu malhelpas la katarakton. Li faras nun animalajn eksperimentojn uzante ratojn, kiam damaĝis la vidkapablon uzante certan substancon, pli poste aplikadis la tomatan ekstrakton. La eksperimento pruvis, ke la katarakto ĉe la ratoj malpliiĝis post la uzado de la ekstrakto de tomato.

Esperantigis: D-ro LÁZÁR Gábor, COVASNA

## Saniga konsilo

**Nigra rafano** solvas galajn kaj renajn ŝtonojn, same ĉiujn salojn aperintajn pro urin-acido. Ĉiutage oni devus manĝi unu pecon da rafano, aŭ almenaŭ elpremi la sukon kaj trinki ĝin diluite per akvo. La kvanton diktas stato de la digestorganoj.

el SANIGA MENUO
de Kristina-Maria LUITE

Bildkart-ekspozicion pri la plej belaj preĝejoj de la mondo organizas 'SIGMOND Julia, 3400 CLUJ-NAPOCA, C.P. 200.
**BONVOLU KONTRIBUI!** (eble pruntedoni?!)

## AGO TAGO

Kiel jam tradicie, la internacia **Ago-Tago** okazos la 4-an de oktobro, t.e. la unuan sabaton de la monato.

En Ago Tago oni ne nur parolu, sed precipe agu. La agad-formoj povas esti plej diversaj, ekde bildkarta ekspozicieto ĝis surstrata manifestacio aŭ transdono de peticio.

Kerno de publika mesaĝo povas esti ekz.: Esperanto portas multkulturismon; la esperantista movado havas bone difinitajn celojn, rilatajn al la problemoj de la nuntempa mondo; esperantistoj povas kunagi sen lingvaj baroj kaj preter landlimoj.

el revuo ESPERANTO

# RECENZO

Jean Ricouart, juna rezistanto, partoprenas tri operaciojn. Li estas kaptita tuj poste kaj deportita. Liberigite de la Rusoj en aprilo 1945, tamen li revenas en Francion nur en februaro 1946, pro tuberkulozo. Kulpigite pro murdkompliceco, far juĝisto kiu praktikis dum la milito, li estas kondamnita al sep jaroj da malliberigo.

El la plej famaj verkoj de D.Daeninckx, tiun veran pledon kontraŭ la milito kaj ties stulteco oni legas kiel detektivromanon.

Anna RAU-LEHOTSKÁ, NADLAC

# NOVAĴOJ

La libroj **La morto neniun forgesas** de Didier DAENINCKX, esperantigita de Christian RIVIERE (FRANCIO) , 172 p. 15.000 leoj kaj **Eĥo de niaj krioj** (dulingva, E-slovaka), tradukoj de 7 slovakaj poetoj el Rumanio far Anna RAU-LEHOTSKÁ, 148 p. 7.000 leoj, aĉeteblas ĉe *Anna RAU-LEHOTSKÁ, str. G.Cosbuc, bl.C, ap 9, cod 2954 NADLAC, jud.ARAD.*

La red.

Ĉi jare denove kreskis la nombro de landaj asocioj de TEJO, per akcepto de Rumana Esperantista Junulara Asocio (RumEJA), kiu jam estas reprezentata en la komitato TEJO, de f-ino Camelia POP, el TIMISOARA.

el revuo ESPERANTO

Septembre en Sibiu okazis la dua kongreso de RumEJA. Ni atendas raportojn de la partoprenantoj, ĉar pri tiu grava aranĝo ni esperas aperigi artikolon en la sekvonta numero de BAZARO. La red.

Inter 10-17 majo en KOŠICE okazis la 49-a IFEF kongreso. Krom la 197 partoprenantoj el 23 landoj partoprenis 50 persona koruso de la Regionaj Fervojoj el Kluĵo, kiun gvidis nia klubano, s-ro Liviu BARDI (DODO). Dum ĉi-tiu kongreso estis prezentita la imponega volumaro de *Fervoja terminaro* en 13 lingvoj, inter kiuj listigas ankaŭ la rumana.

el revuo ESPERANTO

Inter 19 26 julio okazis la 82-a UK en Adelajdo (Australio) kun 1224 partoprenantoj el 57 landoj. La red.

# OPINIOJ, KONSILOJ, KRITIKOJ, PROPONOJ

Ĉirkaŭ 150 ekzempleroj de BAZARO 1 estis dissenditaj al rumaniaj kaj eksterlandaj geesperantistoj kaj bibliotekoj.

Jen la opinioj de niaj legantoj:

Gratulojn pro la unua numero de via BAZARO, kies kvalito ja kreskis. Espereble ĝi daŭre kreskos. Ionel ONET, BERKELEY, USONO

Mi ĝojas, ke finfine ankaŭ en nia lando komenciĝis la ĝermoj de la normala E-movado. Mi esperas, ke tio ĉi estos reala E-aktiveco.

Nun, kiam vi komencas esperantiĝi - tre malfrue - ni, kiuj komencis ĝin, bedaŭrinde, pro nepraktiko! Mi deziras sukceson!

P.S. La titolo BAZARO laŭ mia opinio ne estas trafa. Mi proponas: Esperanto mesaĝisto aŭ Esperanto Novaĵoj.

SZÉKELY Attila, TÂRGU MURES

Dankon pro la unua numero de la revuo BAZARO, kiun mi bonorde ricevis! Finfine aperis inform-kultura revuo por rumanaj esperantistoj. Ni ĉiuj atendis ĝin. Mi deziras al BAZARO longan kaj sukcesplenan vivon.

Ovidiu GORDEA, BRASOV

Ricevinte la unuan numeron, mi salutas la novan E-Revuon de nia lando. Mi deziras ricevadi ĝin plu, esperante, ke la Revuo estos ĉiam en servado de DIO kaj Homo.

Por ĉio mi sendas samtempe perpoŝte la mon-abonon.

Dio benu vian agadon.

JAKUBINYI György, ĉefepiskopo, ALBA IULIA

Mi rapidas reagi eĉ se nur per mallonga letero. Dankon pro la unua numero de BAZARO. Trafoliumante ĝin, mi konstatis, ke ĝia enhavo estas multe pli interesa ol tiu de la 0-a, provnumero. Mi ŝatus ricevi ankaŭ la sekvontajn numerojn. "Obstine antaŭen!" SZÁSZ Lenke, PRAID

Dankegon pro la BAZARO nr.1. Mi sendas al vi ankaŭ la respondojn por la adresaro de rumanaj esperantistoj. Kiam ĝi estos preta, mi ŝatus aĉeti ekzempleron de ĝi. VAJDA Ioan, BRASOV

Varman dankon por via sendaĵo: BAZARO, nr.1.1997, Printempo! Mi gratulas al vi rilate al poresperantista agado kaj mi deziras sukcesplenan agadon por la Asocio de Esperanto Cluj, okaze de eldonado de nia revuo, kiu informas pri la eventoj de nia tutlanda, eĉ tutmonda movado!

Mi klopodas helpi vin, do mi aldonas kelkajn informojn pri medicinaj interesajoj, kiujn mi kompilis tralegante revuon, kion publikis rilate al malkovroj en Israelo. Mi esperas, ke aperos en nia BAZARO ankaŭ scienca rubriko, do mi povus helpi vin ankaŭ dum estonto.

Por la listo de via adresaro laŭ via alvoko mi informas vin pri miaj datumoj. Mi petas vin, ke bonvolu konfirmi la ricevon de mia letero.

Dezirante fruktodonan agadon, bonsanon, feliĉon kaj prosperon de nia landa movado, elkore salutas vin, via,

D-ro LÁZÁR Gábor, COVASNA

Por la plibonigo de la BAZARO necesas esti vi pli severaj en la elekto de la publikigita materialo, des pli, ĉar ĝi estas sendita trans la limoj. Mi opinias, ke ĝi, la BAZARO devas fariĝi oficiala gazeto de la tutlanda Asocio. Pro tio ĝi devas sin prezenti per ĉefartikolo. Devos ankoraŭ publikigi artikolojn pri la stato de la movado. En la "ESPERANTO" n-ro.1093/6/ junio 1997 oni povas legi pri E-o en Rumanio nur jenajn: "Certa organiza malklareco restis en Rumanio, kie la nova LA de UEA, Rumana E-Asocio, ankoraŭ ne plene akceptiĝis, kiel movada tegmento."

Ĉu vi ne volas akcepti la taskon por iniciati organizon de tutlanda konferenco por analizi la staton kaj decidi kiamaniere ni povas reunuigi la fortojn? Estas erigita la movado, disipita en fragmentoj, nomataj "Asocioj", kiuj funkcias kiel "sektoj" plej ofte semante ne nur malharmonion, sed ankaŭ naciismon kaj ŝovinismon. Tre multaj samideanoj kaj samideaninoj iĝis membroj de la ekstremismaj politikaj organizajoj, ĉu rumanlingvaj aŭ hungarlingvaj, kiuj ne meritas nomiĝi esperantistoj!

Pardonon mi petas, sed mi ne povas esti tolerema, des pli kiam mi rememoras pri la floranta E-movado dum la diktaturo.

Ion SÎRBU, BRASOV

Mi gratulas vin pro la vera sukceso, daŭre aperigi BAZARO-n. Mi aprezas la enhavon kaj eble ĉiuj samideanoj kontribuos al ĝia riĉigo.

Aldone mi sendas la tabelon pri oradeanoj, kiuj abonis BAZARO-n. Eble la nombro de ili kreskos.

SZÜCS Iréné, ORADEA

Mi multe estus interesata en ekscio de novaĵoj pri E-agado en Rumanio. Mi estus tre feliĉa, se vi povas sendi al mi provnumeron de BAZARO.

Mi pensas, ke Esperanto povus havi bonan influon super nia ĉiutaga agado.

Mi deziras ekscii, se Radio Cluj havas elsendojn en la Internacia Lingvo Esperanto.

Petre GRUIANU, BUZAU

Antaŭ ĉio mi deziras elkore danki vin pro la sendita n-ro 1.de BAZARO, en kiu mi ĝoje trovis ankaŭ miajn kontribuajojn. Mi ankaŭ multe ĝojas, ke via gazeto pliriĉiĝis kun diversaj temoj kaj jam sopire mi atendas la novan numeron de tiu ege bezonata gazeto.

NAGY Irina, ORADEA

Mi ricevis kun ĝojo la nr-ro 1 de BAZARO. Mi estas kontenta kaj mi laŭdas vian konfidon por la rumanaj geesperantistoj.

Mihai-Aurelian BOGDAN, TURDA

Hodiaŭ mi ricevis ankaŭ la 1-an numeron de la revuo "BAZARO", do nun mi povas havi ĝenéralan impreson pri via iniciativo. Bonvolu ricevi miajn sincerajn dankojn pro sendajoj.

Unue mi devas gratuli vin. Kion vi komencis fari estas ĝuste kion atendis la plej multaj esperantistoj el Rumanio: meti je ilia dispono veran informilon kaj interligilon, tiel ke ĉiu samideano, eĉ el la plej izolita loko, povu interkomuniki kun la aliaj kaj ekscii pri diversaj novajoj el Esperantujo. Samkiel rimarkis la agema veterana esperantisto Ion SÎRBU el Brasov, ankaŭ mi opinias "ke estas necesega la ekzisto de iu presorgano. kiu luktas por la unuiĝo de la rumana esperantistaro...". Sinceraj kaj bonvenaj estas ankaŭ la konsiloj de nia samideano PAPP Tibor el Debrecen, Hungario. Ĉiuj aliaj opinioj enhavantaj en la unua numero, do la opinioj de la legantoj de nula numero, alportas , krom la entuziasmo, la sinceran deziron helpi aŭ kontribui per ilia propra agado al la sukceso de via bonega ideo. Ankaŭ mi faros tiel. Ĉar kelkaj legantoj proponis la ŝanĝon de nomon, anstataŭ BAZARO, mi proponus HEROLDO de RUMANIO, kiu estus pli proksime de ... Esperanto.

Due, vi estas je la komenco de bona vojo. La multaj reagoj kaj promesoj de subteno de via ago demonstras ke vi pravis eldoni la revuon, sed samtempe ili sugestas, ke estonte tute ne mankos materialoj por sekvontaj numeroj. Eĉ mi timas, ke ili abundos kaj vi devos aŭ selekti ilin aŭ pliriĉigi la paĝnumeron. Tio, fakte, estas sukceso kaj kuraĝigo iri pluen. Mi mem povas esti ne nur abonanto, sed ankaŭ permanenta kunlaboranto.

Trie, krom novajoj pri nia loka agado, mi deziras esprimi proprajn opiniojn pri la diversaj aspektoj de la rumania E-movado, precipe rilate al instruado.

Mihai TRIFOI, BICSAD

Mi legis pri BAZARO en ESPERANTO, majo 1997. Mi multe ŝatus ricevi unu ekzempleron de tiu eldonajo. Ĉu tio eblas?

Koran dankon! PACON!

Pekin Tenorio VAZ, BELEM-PA, BRAZILO

Koran dankon pro viaj du numeroj de BAZARO. Mi volas gratuli al vi kaj deziri por via interesa revuo multnombran legantaron.

Anna RAU-LEHOTSKÁ, NADLAC,

En DEBRECENA BULTENO n-ro 101 de julio 1997, kiun ni ricevas por nia biblioteko, sur paĝo 19 estas informo pri apero de nova Esperanto-revuo, titolita BAZARO. Mi volonte havus tri ekzemplerojn de ĝi, pagante aŭ interŝanĝe kontraŭ esperantajojn. Mi esperas, ke de provo faros kutimo kaj la revuo fariĝos tutrumana informilo pri Esperanto en tiu lando. Do, ni volonte abonos ĝin.`

Johano PACHTER,
fondinto de E-biblioteko, BERLIN, GERMANIO

La ideo fari adresaron pri geesperantistoj en Rumanio estas eminenta. Ĝuste la akordigita organizo mankas el nia Esperanto movado.

Ĉiu centro havas siajn entuziasmajn membrojn, sed la individua persono aŭ la izolita grupo dum tempo indiferentiĝas.

Mi korespondas kun dana esperantisto el Martinus Instituto. Li ĉiam interesiĝas pri eldonajoj en Esperanto el Rumanio. Li volas aboni je BAZARO.

SOFINETI Éva, BAIA MARE

Ni ĝojas, ke niaj legantoj aprezas nian revuon kaj ne restas indiferentaj al ĝi. Ni esperas ke, ĝi pluen estos legata kaj bezonata, de la Rumania esperantistaro, kiel nuntempa sola inform-kultura revuo en Rumanio. Ni konsidera ke vi trovas multajn interesajn kaj gravajn informojn, kiu koncernas la enlandar E-movadon.

Aperigo de sciencaj kaj alispecaj rubrikoj dependas de niaj kunlaborantoj. Ĉiam ni atendas viajn interesajn artikolojn.

BAZARO ne povas esti la oficiala organo de tutlanda E-Asocio, simple pro la fakto, ĉar ni deziras resti senpartia revuo, kiu aperas en lingvo Esperanto, do kiu ne rajtas defendi iun ajn opinion kaj en kiu ĉiuj havas la eblecon aperigi siajn opiniojn. Tio ne signifas, ke ni ne apogos ĝin, kontraŭe ni ĉiam estas pretaj aperigi ĝiajn alvokojn, deklarojn ktp.

Bedaŭrinde ni ne havas la eblecon iniciati ian ajn aranĝon por analizi la staton de E-movado en Rumanio, sed ni apogas viajn iniciatojn laŭ niaj eblecoj t.e. pere de BAZARO vi povas kunvoki la esperantistaron enlandan ankaŭ por tiaspeca aranĝo. Ni esperas, ke troviĝos personoj, kiuj helpe ankaŭ de BAZARO, unuigos la esperantistaron de Rumanio. Ni donos al ili nian apogon por realigi nian komunan celon; relanĉi la E-movadon en Rumanio kaj meti ĝin sur firman fundamenton.

Laŭ niaj scioj nek Radio Cluj nek aliaj Rumaniaj radiostacioj dissendas programon en Esperanto. Kiel vi vidas en la nuna numero aperas la radiostacioj, kiuj elsendas en Esperanto.

Dankon pro la apogo de esperantistoj el Oradea, kie troviĝas la plej multnombra abonantaro. Samtempe ni bedaŭras, ke ekster Transilvanio venis nur du reagoj, el Buzau kaj Slatina, kaj estas pli plorenda, ke el Bukareŝto eĉ unu persono ne aboniĝis!

Plue ni atendas vian opinion pri la enhavo de BAZARO, kaj bonvenas viaj proponoj kaj kritikoj. La red.

Ni dankas al **niaj subtenantoj**, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin. Ni dankas al:

Mons. **JAKUBINYI György**, ĉefepiskopo, kiu donacis 50.000 leojn
s-ino **KÓSA Jolanda**, donacis 7.000 leojn
D-rino **POLCZ Alaine**, BUDAPESTO, 10.000 leojn
s-ino **CSERE Erzsébet**, BUDAPESTO, 2.000 Ft.
s-ino **HARNBERGER Hajnal**, BUDAPESTO,1.000 Ft.
**Municipa Kulturdomo** kaj s-ro **Claudiu BANDICI**, ĉar ebligis al ni redakti la nunan numeron per sia komputero.

## ENIGMO

Troviĝas sep domoj de diversaj koloroj. En ĉiu domo loĝas alinacia homo kaj ĉiu el ili havas beston kaj vegetalon. Ankaŭ ĉiu homo havas iun hobion. Pri ili ni scias la sekvantajn:

1. Meze staras la indiga (indigkolora) domo. Unu el siaj najbaroj havas ranon kaj la alia grilon kaj fragon.

2. La bulgaro kiu ŝatas revadi, loĝas inter ruso kaj vjetnamo.

3. La italo loĝas en unu el la finoj de la domvico, en la blua domo, kaj li ŝatas fiŝkapti.

4. La norvego loĝas en la verda domo. Li havas gladiolon kaj ŝatas interparoladi.

5. La loĝanto de la flava domo ŝatas naĝi kaj li havas insekton. Unu el siaj najbaroj, la franco, havas bananon.

6. Unu el la najbaroj de la loĝanto de la nigra domo havas fazanon kaj ŝatas gitarludi. La alia najbaro havas najtingalon kaj vinberon.

7.La najbaro de tiu, kiu havas ranon, havas vulpon kaj la alia najbaro ŝatas veturi.

8. La franco loĝas en la griza domo inter la greko kaj la ruso. Tiu lasta havas najtingalon.

9. La loĝanto de la ruĝa domo havas fazanon kaj ignamon.

10. La najbaro de tiu, kiu ŝatas naĝi, havas vulpon kaj narcison.

**La demando:** Kiu en kia domo havas bubalon kaj kiu en kia domo ŝatas

bicikladi?

La solvon, bonvolu sendi al ni ĝis 15 januaro 1998. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn!

La enigmon sendis: SIMON László, ORADEA

## INTERNACIAJ RADIOELSENDOJ EN ESPERANTO

La horoj de la elsendoj estas laŭ la oficiala vintra Rumania tempo (Orienta Eŭropa Tempo)!

*Ĉiutagaj elsendoj*

| Horo | Stacio | Frekvenco | Kaptebla |
|---|---|---|---|
| 07:30-08:00 | Pola R. Varsovio | Sat(1) | Eŭropo |
| 14:00-14:27* | Ĉina R. Internacia | 7170, 9570 | Orienta Azio, Japanio, Koreio |
| 16:00-16:27* | Ĉina R. Internacia | 11840, 11600 | Sudorienta Azio |
| 16:30-17:00 | Pola R. Varsovio | 7145, 7285, 6000, Sat(1) | Eŭropo |
| 21:00-21:30 | Pola R. Varsovio | 6035, Sat(1) | Eŭropo |
| 22:25-22:30 | Pola R. Vars./WRN | Sat(2) | Eŭropo |
| 23:00-23.27* | Ĉina R. Internacia | 7405, 9965 | Eŭropo |
| 23:30-23:55 | Pola R. Varsovio | 7270, 6035, 6095 | Eŭropo |
| 01:30-01:57* | Ĉina R. Internacia | 9860, 6950 | Latin-Ameriko, Eŭropo |

*Dimanĉaj elsendoj*

| Horo | Stacio | Frekvenco | Kaptebla |
|---|---|---|---|
| 07:05-07:30 | R.Aŭstria Internacia | 6155, Sat(3) | Eŭropo |
| 10:00-10.30* | R. Havano Kubo | 9820 | Pacifika Azio, Norda Ameriko |
| 17:05-17:30 | R.Aŭstria Internacia | 6155, 13730, Sat(3) | Eŭropo, Okcidenta Afriko |
| 18:00-18:30* | R. Havano Kubo | 11760 | Ameriko, Karibio |
| 22:20-22:30 | R. Vatikana | 527, 1530, 5882, 4005, Sat(4) | Eŭropo |
| 22:20-22:30 | R. Vatikana | Sat(5) | Ameriko |
| 22:30-23:00* | R. Havano Kubo | 13715 | Eŭropo, Mediteraneo |
| 01:00-01:30* | R. Havano Kubo | 13715 | Eŭropo, Mediteraneo |
| 02:05-02:30 | R.Aŭstria Internacia | 9870 | Latin-Ameriko |
| 02:30-03:00* | R. Havano Kubo | 11760, 11875, 6070 | Ameriko, Karibio |

| | | | |
|---|---|---|---|
| *Dum aliaj tagoj* | | | |
| 22:20-22:35 | R. Vatikana | 1611, 6185, 7365 | Eŭropo (merkrede) |
| 22:20-22:35 | R. Vatikana | Sat(6) | Azio, Afriko (merkrede) |
| 22:30-22:45 | Estona Radio | 5925 | Eŭropo (marde) |
| 23:00-23:20* | RAI Internacia | 7180, 9785, Sat(7) | Eŭropo (sabate) |

* ekde 25 okt. 1997 unu horon pli frue

*Satelitaj indikoj*

(1) Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
(2) Astra 19.2 E, 11.538 GHz Vpol (VH1), 7.38 MHz (World Radio Network 1 Europe, 4-minuta reelsendo de la posttagmeza programo de Pola Radio)
(3) Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (BFS 3), 8.10 Mhz, per Astra Digita Radio (ADR)
(4) Eutelsat II F1 13 E, 10.987 GHz Vpol (NBC), 7.38 MHz (Eŭropo)
(5) Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Amerikoj)
(6) Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)
(7) Eutelsat 13 E (Hot Bird 1), 11.446 MHz Vpol (RAI Due), 7.56 MHz

Pri la elsendoj vi povas informiĝi ankaŭ jena Intrereta adreso: <*http://members.aol.com/OSIEK/AERA*>

## ARANĜOJ EN ESPERANTUJO

### 41-a INTERNACIA SEMINARIO (IS)

*27 decembro 1997-03 januaro 1998, TRABEN-TRABACH, GERMANIO*

Temo: Socio kaj komunikado

Kotizoj por Rumanianoj:

| | antaŭ 01.12.97. | poste / surloke |
|---|---|---|
| <20 jaroj | 170 DM | 230 DM |
| 21 - 26 jaroj | 210 DM | 270 DM |
| >26 jaroj | 270 DM | 320 DM |

Por memzorgantoj:

| | antaŭ 01.12.97. | poste / surloke |
|---|---|---|
| <26 jaroj | 30 DM | 60 DM |
| >26 jaroj | 70 DM | 100 DM |

Invitletero peteble nur ĝis 01.12.97. kontraŭ 5 DM.

**La plena kotizo inkluzivas la loĝadon kaj manĝadon en la junulargastejo kun 4-litaj ĉambroj (ĉiu kun duŝejo kaj necesejo), la programon kaj la silvestran bufedon.**

**La kotizo por memzorgantoj inkluzivas la loĝadon en amasloĝejoj, la programon kaj la silvestran bufedon.**

**Aliĝu al: Marc Stessgen, Hagedornstr. 6a, DE-51069 KÖLN, Tel./faksilo +49-221-685597, retpoŝto djnucki@aol.com**

**22-a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO**

*8-14 aprilo 1998, LIGNANO SABBIARDO (UDINE), ITALIO*

**Temo: Bunta Europo**

**Kotizoj por Rumanianoj:**

| | ĝis 03.01.98 | ĝis 04.01.98 | Poste |
|---|---|---|---|
| <19 jaroj | 115.000 ITL | 130.000 ITL | 150.000 ITL |
| 20-24 jaroj | 130.000 ITL | 150.000 ITL | 170.000 ITL |
| 25-29 jaroj | 150.000 ITL | 170.000 ITL | 195.000 ITL |
| >30 jaroj | 170.000 ITL | 195.000 ITL | 225.000 ITL |

**Memzorgantoj 80.000 ITL**

**Oni sendas invitleteron kontraŭ 5.000 ITL.**

**La kotizo inkluzivas programon, manĝadon kaj loĝadon en du- aŭ trilitaj ĉambro.**

**La kotizo de la memzorgantoj inkluzivas nur programon kaj loĝadon en aparta ejo.**

**5-a MARA INTERNACIA RENKONTIĜO**

*21-25 julio1998, SAVUDRIJA, KROATIO*

**Temo: Maro**

**Kotizoj por Rumanianoj: 90 DM ĝis 03.01.98.**
**110 DM ĝis 30.04.98.**
**130 DM poste**

**La kotizo inkluzivas loĝadon en 2-4 litaj dometoj en kampo apud maro, manĝadon kaj programon.**

**Aliĝu al: KEJA, Amruševa 5/I, HR-10000 ZAGREB, KROATIO, Tel/faksilo:+385-1-4810152, Informoj troveblas ankaŭ en la TTT-paĝo: http://pubwww.srce.hr/keja**

**83-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

*1-8 aŭgusto 1998 MONTPELLIER, FRANCIO*

**Pliaj informoj kaj aliĝiloj akireblas de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, NEDERLANDO.**

**54-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO**

*25 julio-1 aŭgusto 1998, RIJEKA, KROATIO*

Temo: Amaskomunikiloj, kreantoj de amaskulturo

Kotizoj por Rumanianoj:

| | ĝis 03.01.98. | ĝis 30.04.98. | Poste |
|---|---|---|---|
| <19 jaroj | 190 DM | 230 DM | 250 DM |
| 19-26 jaroj | 230 DM | 260 DM | 290 DM |
| >26 jaroj | 270 DM | 310 DM | 340 DM |

Ne-individuaj membroj de TEJO kaj UEA krompagas la duoblon de la respektiva landa TEJO/UEA kotizo por 1998.

La kotizo inkluzivas loĝadon (2-3 litaj ĉambroj) en la studenta domo, manĝadon kaj programon.

Aliĝu al: KEJA, Amruševa 5/I, HR-10000 ZAGREB, KROATIO, Tel/faksilo:+385-1-4810152, Informoj troveblas ankaŭ en la TTT-paĝo: http://pubwww.srce.hr/keja

**KULTURA ESPERANTO FESTIVALO (KEF 98)**

*10-16 aŭgusto 1998, LESJÖFORS, SVEDIO*

Kotizoj por Rumanianoj:

Por kompleta programo: 300SEK por malpli ol 20 jaraĝuloj
400SEK por 20-30 jaraĝuloj
500SEK por pli ol 30 jaraĝuloj

Por manĝoj: 600SEK (tri manĝojn po tago), Eblas memmastrumado.

Por loĝado: 540 SEK en junulargastejo
150 SEK en amasloĝejo

Aliĝu al: Janko Luin Myggdalsvägen 123, SE-135 42 TYRESÖ, SVEDIO, retadreso: janko@esperanto.se

## KORESPONDI DEZIRAS

s-ro **Petre GRUIANU**, esperantisto ekde 1983 kun rumanaj esperantistoj. Bd. Unirii Bl.24, Sc.B, Ap.24, RO-5100 BUZAU, RUMANIO

s-ino **NAGY Irina**, 45 j. amatora pentristino, kun geesperantistoj tutmondaj pri iu ajn temo. Aleea Salca nr.13, Bl.Q7, Ap.4, RO-3700 ORADEA, RUMANIO

s-ro **Mihai-Aurelian BOGDAN**, 15 j., kun la tuta mondo pri astrologio, literaturo SF, poemoj kaj paranormalo. str.Nuferilor nr.21, Bl.C15,Sc.A, Ap.12. RO-3350 TURDA, RUMANIO

s-ro **BALCZER János**, vegetariano, H-1045 BUDAPEST, Rózsa u.8.VIII.48, HUNGARIO.

s-ino **Cornelia COCIS, 44 j., pri diversaj temoj (literaturo, psikologio), str. Pasteur nr.71, Bl.VIIF, Sc.IV, Ap.40, RO-3400 CLUJ-NAPOCA, RUMANIO**

**Se vi deziras korespondi esperante, trovi geamikojn tra la mondo, skribu al:**

**KORESPONDA SERVO MONDSKALA**

**B.P.6, F-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

## (Re)aliĝu al Pasporta Servo

La internacia reto de gastigantoj havis en sia lasta eldono (1996/97) 784 gastigantojn en 68 landoj. Tiu kajero tiom furoris ke, ĝi estas nun tute elĉerpita. La kompila teamo delonge laboradas por ĝustatempe.produkti novan eldonon, kiu aperu en januaro 1998.

Se vi jam estas gastiganto, vi ricevis respondilon por re-aliĝi. Se vi deziras fariĝi gastiganto, petu aliĝilon de via landa organizanto aŭ de TEJO, plenigu kaj resendu ĝin nepre antaŭ la l-a de oktobro 1997 al: Pasporta Servo de TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.:+31-10-4361044, faksilo: 4361751.

Reta-aliĝilo: <lide@worldaccess.nl>.

(Provizora) hejmpaĝo: http:///www.worldaccess.nl/~lide/paspserv.htm.

## FUNDAMENTA KRESTOMATIO DE LA LINGVO ESPERANTO de D-ro L. L. ZAMENHOF

§5. (Ekzercaro, §9.)

La birdoj flugas. - La kanto de la birdoj estas agrabla. - Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki. - La knabo forpelis la birdojn. - Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj. - Bonaj infanoj lernas diligente. - Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron. - De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon. - Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo. - Mi legas libron. - La patro ne legas libron, sed li skribas leteron.

§6. (Ekzercaro, §10.)

Papero estas blanka. -Blanka papero kuŝas sur la tablo. -La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo. -Jen estas la kajero de la juna fraŭlino. -La patro donis al ni dolĉan pomon. -Rakontu al nia juna amiko belan historion. -

Mi ne amas obstinajn homojn. -Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! - Bonan matenon! Ĝojan feston! (Mi deziras al vi). -Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ). -Sur

la ĉielo staras la bela suno. -En la tago ni vidas la helan sunon kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn. -La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka. -Lakto estas pli nutra, ol vino. -Mi havas pli freŝan panon, ol vi. -Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas pli freŝa, ol mia. -El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna. -Mi estas tiel forta, kiel vi. -El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.

§7. (Ekzercaro, §11.)

La feino.

Unu vidvino havis du filinojn. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.

§8. (Ekzercaro, §12.)

Du homoj povas pli multe fari, ol unu. -Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn. -Li promenas kun tri hundoj. -Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj. -El siaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj la aliaj malbonaj. -Kvin kaj sep faras dekdu. -Dek kaj dek faras dudek. - Kvar kaj dek ok faras dudek du. -Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin. -Mil okcent naŭdek tri. -Li havas dek unu infanojn. -Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj. -Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, Decembro estas la dek-dua. -La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro. - La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj. -Kion Dio kreis en la sesa tago? -Kiun daton ni havas hodiaŭ? -Hodiaŭ estas la dudek sepa tago de Marto. -Georgo Vaŝingtono estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.


§9. (Ekzercaro, §13)

La feino (Daŭrigo)

Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese. Inter aliaj aferoj tiu ĉI malfeliĉa infano devis du fojojnen ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon.

ASOCIO de ESPERANTO
C.P. 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO




06 10 97 09

# IMPRIMATE

al PAPP TIBOR
TROMBITÁS u. 12.
H-4031 DEBRECEN
UNGARIA